




# BOLETIN

DE LA FEDERACION ESPAÑOLA  
DE ESPERANTO

AÑO XXII - Nº 266

NOVIEMBRE-DICIEMBRE 1984



Prosperan Novjaron 1985-a

## BOLETIN DE LA FEDERACION ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Directora: María Aurora Viloria

DIRECCION Y ADMINISTRACION

Apartado, 119; 47080 VALLADOLID

REDACTOR JEFE

Salvador Aragay Galbany  
Bassegoda, 40  
Tfno: (93)338081  
08028 BARCELONA

COMITE DE REDACCION

Giordano Moya  
Vicente Hernández Llusera  
Gabriel Mora i Arana  
Andrés Martín González  
Luis Serrano Pérez  
Miguel Gutiérrez Aduriz

## ENHAVO

	Paĝo
Esperanto inter la planlingvoj	3
Universitatoj por Paco	6
La Pipulo	8
Vigo kongresurbo por 1986-a kaj diversaj informoj	9
Pri la Landnomoj	10
Kial mi skribis Gvadiano anstataŭ Gvadiano	11
Niaj Grupoj	14
12-a Rekontiĝo de la Valencia Esperantistaro	15
Internaciaj Kongresoj kaj kunvenoj	15
Grava lastmomenta informo	16
Modificaciones al Directorio	17
45-a Hispana Kongreso de Espe- ranto	18
La Esperanto-Bultenoj	20
Recenzoj, recenzoj, recenzoj	21
Deziraro korespondi	23
Nekrologo	23

## UTILAJ ADRESOJ

Federación Española de Esperanto  
(Hispana Esperanto-Federacio)  
Apartado, 119  
47080 VALLADOLID

Prezidantino

María Rafaela Uruña Álvarez  
Avda. Ramón y Cajal, 12, 2º C.  
Tfno (983) 260086  
47011 VALLADOLID

Sekretario

Luis Hernández García  
adreso kiel supre

Kasistino

Carmen Conde Labajo  
Calixto Valverde, 8, 8º A  
47014 VALLADOLID

Pagoj sendu al nia Konto  
Nº 001.664-0  
Caja de Ahorros Popular  
Ag. Urbana 6  
Avda. Vicente Mortes  
47014 VALLADOLID

Libro-Servo de H.E.F.

José González Suárez  
Apartado, 119  
47080 VALLADOLID

Pagoj por libro-servo sendu al unu el la  
jenaj kontoj:

Cuenta Postal: 3.118.078 VALLADOLID

Caja de Ahorros Popular  
Oficina Central  
Cta. Nº 042.268-4 a nombre de  
LIBRO-SERVO DE LA FEDERACION  
ESPAÑOLA DE ESPERANTO

Eldona Fako

Inés Gastón  
Pº de la Constitución, 35, 4º  
50001 ZARAGOZA

Ĉefdelegito de U.E.A.

Juan Azcuénaga Vierna  
Gral. Dávila, 127 portal 7, 2º Izda.  
Tfno: (942) 339487  
Cuenta Postal 03548531  
39003 SANTANDER

Informa-Fako

Enrique Piquero Vázquez  
Asin y Palacios, 8, 6º A  
50009 ZARAGOZA

# Esperanto inter la planlingvoj

(Resumo de la esperantlingva prelego dum la 44-a H.E.K.)

Sendube, unu el la ĉefaj trajtoj, kiuj karakterizas la homaron kaj ĝin distingas disde la ceteraj vivuloj estas la komunikado aŭ, pli bone dirite, la komunikemo. Por plenumi ĉi tiun celon la homo disponas ampleksan stokon da sistemoj inter kiuj elstaras la naturaj (aŭ historiaj, laŭ nuancigo de fama lingvisto) lingvoj, sed oni devas konsideri, ke tiu elstareco nur dependas de ilia tradicio aŭ de ilia ofta uzateco sed fakte ne de ilia pligranda perfekteco rilate aliajn lingvojn maltrafe nomitajn «artefaritaj». Ĉi tiujn ni preferas etiketi «planitaj», ĉar, vere, ili nur diferencas de la naturaj lingvoj pro sia estiĝo aŭ, plibone estigo sed en la praktiko ili povas atingi saman komunikapablecon, saman nuancigopovon aŭ spontanegan evoluon kaj, definitive, saman naturecon.

El tio supre dirita, fakto evidentiĝas: la homo posedas komunikilojn naturajn kaj planajn. La planaj (kaj jen nia konigemo) ne nur estas enkorpigita de la bone konataj konvenciaj kodegoj (trafiksignaloj, Morse-a alfabeto, Esperanto, maristaj indikiloj, ktp.) sed ankaŭ de ampleksa kaj multenombra serio da sistemoj, ĝenerale ekskluzive porskribaj apenaŭ vastigitaj kaj aperintaj unu post la alia dum jarcentoj kio estas nepre referencpunkto por pli ĝuste kompreni la naskiĝon de la grandaj planitaj lingvoj kiel Volapük, Espe-

ranto, Ido, kaj aliaj, kiuj, tiamaniere, ne aperis subite al nenie, sed klare influite de tiu longa «legio» da **precedencaĵoj**.

Unuj kaj aliaj, finfine, starigas la ege variecan planlingvaron, kiun jam intuis en 1929-a pioniro de la interlingvistiko, P. Stojan, en sia leginda verko **Bibliografio de internacia lingvo**, en kiu li tute prave memorigas al ni, ke la ideo pri plana kaj mondhelpe lingvaĵo nur iris kreskadante jarcenton post jarcento, malrapidege, ekster la antikvaj provaĵoj de la universala scienco, de la sekreta skribado, de la ideografio, de la mimika mesaĝo, ktp., kaj samtempe ekster de la praaj kredoj pri la mistikeco de la ciferoj, pri la dia origino de la parolo aŭ pri la latenteo de la vortoj... Mem Stojan konsilas al ni retrorigardon al pitagorismo aŭ al hinda veda filozofio.

La celo de Stojan, kiun ni konsentas, orientiĝas en la serĉon de «komunikaj kanaloj» permesontaj interrilatigi la diverstipajn kaj multnombrajn manifestaĵojn de lingva planeco...: «Sekvante la natursciencan metodon aplikatan al la historio de universala lingvo, ni retrovas intiman «sangan» parencecon inter ĉiuj mezepokaj ludoj je ciferoj, ĉifroj, magiaj formuloj... kaj ĉiuj postaj utopioj pri la perfekta pazilogio, universala karakteristiko, pazigrafio kaj pansofio. Dio kreis la lingvon —tia

estis la prahinda kredo. Adamo kreis la lingvon— tiel «sciis» la mezepoka Eŭropo. En ambaŭ filozofioj la lingvo prezentiĝas kiel **artefarita** produkto, unue perfekta kaj unika, poste degenerita, dispecigita, difekta kaj ĉiuj grandaj saĝuloj, en ĉiuj terpartoj kaj tempoj, pli aŭ malpli konscie revis trovi la perditan paradizon de la perfekta primitiva lingvo, spegulo de Dio. Poste, kun la materia progreso, la filozofoj pli kaj pli fidis je la homa racio, kaj tiel aperis la ideo pri **kreota** de homoj perfekta lingvo, aŭ pri rekonstruota de filologoj praa «komuna idiomo».

En la 18a jarcento malfermiĝas vera «industrio» de mondlingvanoj, orgio de ambiciaj projektantoj, el kiuj ĉiu sin kredas esti nova mesio. Paralele, en scienca sfero marŝas serioza studado de: gestoj de sovaĝuloj, gestlingvoj por surdmutuloj, hieroglifoj, ĉina ideografio, parenceco inter lingvaj familioj; kreiĝas universalaj abocoj per laboro de lingvistoj, misianoj; progresas algebra logiko kun analiza matematiko; starigas signalaro de maristoj, signalo de kemio, de astronomio; evoluas latina scienca helplingvo, kaj tiel prepariĝas **serioza bazo** sur kiu la hieraŭaj fantaziadoj povas efektiviĝi sub utila formo. La mondlingva problemo duobliĝas, disvojiĝas al du fluoj: praktika internacia skrib- kaj parollingvo unuflanke, kaj teoria idologia pazigrafio aliflanke».

La unua konsistante el kodoj preskaŭ ekskluzive skribaj, filozofiecaj, entenantaj hermetikan, kaŝan simbolaron, kun la celo klasifiki teorie la homan penson. Ili estas do, sistemoj de nedubebbla scienca karaktero, universalemoj nur je la senco de eltiro de komunaj homaj pensaĵoj,

sed ne je la senco de ĝia uzoteco fare de la tuta mondo. Ili estas kutime nomataj **pazigrafioj** (alivorte: skribaj universalaj sistemoj). Normale iliaj grafikajoj ne estas eltirataj el la tradiciaj abocoj (latina, slava, ktp.).

Kaj la dua konsistante el kodoj tute paroleblaj kun konscia universala komunikemo (ne elita, scienceca) kaj kun klara lingva strukturo. Ili prezentiĝas kiel praktikaj, facilaj sistemoj taŭgaj por nekomplika lernado aŭ instruado. Ĉi tie ja inkluziviĝas la konataj grandaj projektoj (Ido, Interlingua, Occidental, Novial, ktp.) kies ŝlosila elirpunkto estas Esperanto (1887-a) kiu definitive superis la antaŭan lingvoprojektan fazon konsistantan je kodoj de artefaritaj radikoj (lingvoj aprioriaj) kies lasta naskitaĵo estas Volapük (1879-a) ankoraŭ komplikeca pro la modifo de la naturaj radikoj. Finfine, la aposterioriaj lingvoj (bazitaj sur radikoj naturaj kaj konataj komenciĝas ekde Esperanto kaj enhavas du grupojn: unuan, el lingvoj skemaj kun reguligo kaj unuformigo de la radikoj, kiel Esperanto mem kaj duan, el lingvoj naturemaj kun diverseco de radikoj, malregulaĵoj, esceptaĵoj, imite de la naturaj lingvoj, kiel Ido, Interlingva, ktp.

Sed, malgraŭ siaj rimarkeblaj diferencoj, la lingvoj enkorpigantaj la duan ĝeneralan grupon havas komunan trajton: sian **paroleblecon**; pro tio ili estas nomataj **pazilalioj** (alivorte: skribaj kaj paroleblaj universalaj sistemoj, diference de la pazigrafioj, strikte skribaj).

Nia afero, do, preskaŭ nevole kaj ne rimarkate sufiĉe komplikiĝis, kiel vere komplika videbliĝas la multaspekta amaso da planitaj lingvoj.

Pro tio, panorama sinoptika skemo estas:

- 1) PAZIGRAFIOJ (skribaj, neparoleblaj, elitaj)
- 2) PAZILALIOJ (skribaj, paroleblaj, tutmondemaj)

**aprioriaj**

(radikoj artefaritaj)

**aposterioriaj**

(radikoj eltiritaj el naturaj lingvoj):

Skemaj (reguleco de la radikoj)

Naturemaj (malreguleco de la radikoj)

Eĉ ankoraŭ plie: Esperanto en sia unua tempo, estis konceptita kiel aprioria lingvo, kun tute nove originalaj radikoj, kiel agnoskas Zamenhof mem... «Multe pli frue, kiam mi serĉis kaj eŝfetadis ĉion senbezonan al la gramatiko, mi volis uzi la principon de la ekonomio ankaŭ por la vortoj, kaj konvinkita, ke estas tute egale kian formon havos tiu aŭ alia vorto, mi simple «elpensadis» vortojn, penante, ke ili estu kiel eble plej mallongaj kaj ne havu senbezonan nombron da literoj. Mi diris al mi, ke anstataŭ ia 13-litera «interparoladi» ni tute bone povas esprimi la saman ideon per ia ekz 2-litera «pa». Tial mi simple skribis la matematikan serion de plej mallongaj, sed facile el-paroleblaj kunigoj de literoj, kaj al ĉiu el ili mi donis la signifon de difinita vorto (ekz.: a, ab, ac, ad... ba, ca, da,... e, eb, ec,... be, ce... aba, aca... ktp.) Sed ĉi tiun penson mi tuj forĵetis, ĉar la provoj kun mi mem, montris al mi, ke tiaj elpensitaj vortoj estas tre malfacile memoreblaj. Jam tiam mi konvinkigis, ke la materialo por la vortaro devas esti romana-germana, sanĝita nur tiom, kiom postulas la reguleco kaj aliaj

gravaj kondicoj de la lingvo» («Letero pri la deveno de Esperanto» en **Lingvaj Respondoj**).

La nuntempa prefero al ĉi tiaj lingvoj ne nur devenas de la planantoj mem, sed ankaŭ el verkistoj kiuj, tre diversmaniere, skribis pri la lingvoplaneca afero (L. Tolstoj; M. Gorki; J. Verne, E. D'Ors, G. Diego, R. Tagore, Lusin,...), sciencistoj (L. Lumiere, A. Einstein, R. de Saussure, E. Privat, G. Marconi, L. Torres Quevedo, I. Lapenna...) kaj lingvistoj (M. Müller, W. E. Collinson, A. Meillet, L. Couturat, A. Martinet, H. Schuchardt, E. Wüster, J. I. Bauduin de Courtenay, O. Jespersen, E. Sapir, M. Pai...)

Ĉiuj ĉi aludoj, finfine, pravas, ke Esperanto ne nur havas antaŭ si longdaŭran lingvokrean bazon sed ankaŭ samtempajn «konkurantojn» kaj sekvantajn au «reformantojn» (la Esperantidoj), ĉiujn tre diversajn laŭ P. Stojan kun kies jenaj vortoj ni finas la prelegon... «En nuna momento, apud Esperanto, nur tri praktikataj sistemoj havas adeptojn: Interlingva, Occidental kaj Ido. Deko da kandidatoj sin prezentas pli malpli serioze: Novial, Ro, Oosmiami, Hom-Idyomo, Nov-Esperanto, Monario, Novan, Espido, Serve, Esperanta. La resto, grandega plimulto, estas mortinta aŭ mortenaskita aro da lingvetoj, projektoj, skizoj, jam maloftajoj, plejparte netroveblaj. Granda tombaro, des pli respektinda, ke el ĝia humuso senhalte kreskas novaj plantoj...» (1).

MANUEL RAMIREZ CEPEDA

(1) **Noto de la Redaktoroj**

Tiujn vortojn skribis P. STOJAN antaŭ 50 jaroj. De tiam la tombaro pligrandiĝis.

# UNIVERSITATOJ POR PACO

En «Esperanto» (1984 julio-aŭgusto) aperis artikolo subskribita de Humprey Tonkin pri «La Universitato por Paco», kiun Unuiĝintaj Nacioj (UN) starigis en Kostariko. Ni profitas la okazon de tiu novaĵo por ankaŭ mencii, ke en Sant Cugat del Vallés, urbo kiu situas en la cirkaŭaĵo de Barcelono, okazis dum la unua semajno de aŭgusto, «Internacia Universitato de la Paco». Ĝin inaŭguris kaj estis ĝia prezidanto la nobelpremiito pri la paco Adolfo Pérez Esquivel.

Tiel same la Universitato por la Paco de la Unuiĝintaj Nacioj, kiel la Internacia Universitato de la Paco en Sant Cugat del Vallés ne estas ordinaraj universitatoj kun katedroestroj kaj junaj aŭskultantaj lernantoj. Ili estas novaj seriozaj institucioj por funde esplori la kaŭzojn de la milito kaj la eblaĵojn por la mond-paco.

Nuntempe la milito, pro la prospera scienco kaj tekniko al ĝi aplikata, fariĝis minaco eĉ por la plua ekzistado de la homo mem sur la Tero. Certe, ankoraŭ multaj homoj restas surdaj al la alvoko por la pacifisma agado, sed ni troviĝas en stadio de la civilizacio neniam antaŭe spertita. La konduto de la homoj kaj ilia sinteno fronte al la milito ne povas plu esti indiferenta al tia minaco.


Kia estas nia pozicio kiel esperantistoj rilate la militon? Kompreneble la esperantismo estas paca afero, sed fakte la pacifismo ne estas ĝia precipa klopodado. Ni multe cerbumas pri gramatikaj eroj, sed reale ni ne multe okupiĝas pri la socia karaktero de Esperanto.

Hodiaŭ la lingvo Esperanto laŭ lingva aspekto estas tute stabilita kaj tre prospera rilate la literaturon. Ni ne povas timi pri la sukceso de la

lingvo. Pri ĝia disvastiĝo la afero ne estas tiel kontentiga.

Esperanto nuntempe estas klopodado de eta minoritato kaj en tio tro rolas la socia karaktero de la esperantismo, ĉar la prospero de ĝia disvastigado rekte estas en rilato al ĝia socia signifo. Vere estas, ke en la unua Kongreso de Esperanto en Boulogne-sur-Mer en la jaro 1905-a estis aprobita rezolucio pri la neŭtraleco de Esperanto. Tamen de 1905-a ĝis nun okazis du mondmilitoj kaj hodiaŭ ni povas troviĝi sur la sojlo de la tria kaj lasta. Tion ne antaŭvidis la tiamaj esperantistoj kunvenintaj en Boulogne-sur-Mer. Iliaj tiamaj konkludoj, kiel ĉio rilate la estontecon, ne estas eternaj veroj. Pro tio, kion aprobis kongreso de esperantistoj, aliaj kongresoj samrajte povas modifi. La nuntempaj cirkonstancoj estas tute aliaj ol la tiutempaj tamen ni aprobas la neŭtralecon de la esperantismo, ĉar ĝi evitis probablajn disputojn, kiam ili povis ruinigi la ĵus naskitan lingvon. Sed parolante pri neŭtraleco ni devas difini la ĝustan signifon de neŭtraleco.

PIV difinas neŭtralecon: «Stato de persono, grupo aŭ ŝtato, kiu ne volas partopreni en io, kio bataligas la aliajn». Vere ni estas kaj devas esti neŭtralaj laŭ etimologia signifo. Sed esti neŭtrala ne estas la samo ol esti indiferenta. Laŭ PIV, indiferenta: «Montrante nenian preferon, interese pri iu aŭ io». Prave oni devas esti neŭtralaj pri la du blokoj, kies alfrontiĝo minacas la pacon, sed ni ne povas esti indiferentaj al la minaco mem de milito, kiam la origina celado de la esperantismo precize estas: «Ne al glavo sangon soifanta. Ĝi la homan tiras familion. Al la Mond' eterne militanta. Ĝi promesas sank-



tan harmonion». (Kaj nun la glavo estas la atomaj kaj nukleaj armiloj).

Esperanto kiel movado ne prosperas por tuj disvastiĝi en la tutan mondon kaj efektive fariĝi historia faktoro por la mondopaco. Kial? La esperantista afero funde estas socia kaj ni neglektis la socian flankon de la esperantismo. Ni socie al la mond'eterne militanta promesas nenion. Oni ne miru, ke la esperantismo stagnas.

Ambaŭ Universitatoj por la Paco ne estis iniciatitaj de la esperantismo, ni rutine plu vegetas indiferentaj al la gravaj problemoj de la nuntempa socio. Nia pacamo estas restaĵo de romantikismo, kaj la afero paco jam ne estas songa revo, estas afero de vivo au morto.

La Universitato por Paco de Unuiĝintaj Nacioj laboris super kvin temoj:

UNA.—«Pacon, sekurecon, konfliktosolvadon kaj tutmondan tansformadon».

DUA.—Rilatas al la «Monda Ekonomio».

TRIA.—Pritraktas: «Malsaton, malriĉon, rimedojn kaj la homan medion».

KVARA.—Ĝi rilatas al «Homa kaj socia evoluigo kaj la kunekzistado de popoloj, kulturoj kaj sociaj sistemoj».

KVINA.—Esploras: «Sciencon kaj teknologion kaj iliajn sociajn kaj etikajn implicojn».

La studado de tiuj temoj ne estas en rilato al neŭtraleco. Tiuj pactemoj de la Universitato por Paco de UN estas gravegaj por nia civilizacio. Ni nenial devas esti indiferentaj al ili. Se tiaj ni estus, kial plendi, ke la amasoj estas indiferentaj al la esperantismo? Ni devas vekigi. La esperantismo ne plu ŝajnu esti anstataŭ esperantista movado, esperantista dormado. La lingvo Esperanto estas pli ol lingvo por diletantoj, ĝi rekte rilatas aŭ devas rilati kun movado por alporti la mondopacon.

En Sant Cugat del Vallés oni fondis Internacian Universitaton de la Paco por ĉiu somere pritrakti, funde kaj science praktikajn ilojn alkonduktantajn al la mondopaco. Kial la esperantistoj, jam de multaj jaroj, ne iniciatis similajn instituciojn, kiam la posedo de la Lingvo Internacia ebligas la rektan komunikigon evitante la uzadon de la samtempa tradukado, kiu funkciis en Sant Cugat?

Ke niaj publikigaĵoj, renkontiĝoj kaj kongresoj estu, per kaj por la lingvo Esperanto, la propra **Universitato por la Paco**.

G. Moya

# LA PIPULO

La pipo ĉiam akompanis lin; ja ŝajnis, ke la tordita pipo ne povis vivi sen li. Kaj delectiĝe li suĉadis dum la tuta tago la akran guston de fetora, ne brulema tabako.

Oni povis vidi lin, samaspektan, multfoje en ĉiu labortago, transportantan rubon, sur lia ĉaro, kun la pipo pendanta el lia buŝo kaj eliganta nur nebuletojn blujajn. Tiu pipo estis vere obstina, intence farita por malhelpi la intensigan volupton bruligi tabakon kun ne retenebla plezuro.

La pipo estis por tiu vizaĝo elemento tiel natura, kiel speciala kurbo de nazo, la largeco de frunto aŭ l'elstareco de mentono. Sed kiel mienis la pipulo? Mi preskaŭ ne scius kiel priskribi la manieron, ĉar lia tuta senafekteco kuŝis en tiu pipo kaj en la maniero tenadi ĝin. Kaj li eble eĉ ne sciis, ke ili ambaŭ formis unu solan personon, kaj ke la konstanta kaj kvieta suĉado stampis lian karakteron per la singardemo de homo ne parolema, kies malmultaj esprimoj, kvankam ne akraj, estis dirataj per vortoj pene elirantaj interdentente.

Sed, same kiel multaj homoj pri kiuj oni skribas ion anekdotan pri ilia vivo, la pipulo mortis de fulmeca apopleksio. Kaj ĵus mortinte, li ne havis tempon por miene aliigi nek por preni la teniĝon propran al mortinto. Evidente, io stranga emanis el lia sangvina, dormanta vizaĝo. Kaj tiuj personoj, kiuj vizitis lin mortintan, kompreneble atribuis tion al la morto.

Lia pli aĝa filino, estante sola kun li, viglante lin, subite aŭdis kvazaŭ ŝia patro parolus al ŝi kaj petegus ion. Nura iluzio! Sed ŝi, obeante la sugestojn de imaga voĉo, metis la pipon al li, inter la lipojn, celante tiun naturecon tiel karakterizan de tiu viro kiam li vivis. Kaj eĉ ne unu momenton ŝajnis al ŝi, ke ŝi agis malrespekte. Kontraŭe, ŝajnis al ŝi ke ŝia patro esprimas sinceran dankon.

Alvenis aliaj personoj kiuj komentadis: «Kiel natura li restis; eĉ ne ŝajnas ke li estas mortinta!». Neniu rimarkis ion strangan en l' aspekto de tiu kadavro jam havanta apud la lito la ĉerkon en kiun la viroj de la sepultentrepeno baldaŭ enfermos lin.

Fine venis la dolora momento por la familianoj kaj amikoj: du sepultistoj levis lin rigidan kaj metis lin en la ĉerkon. Sed antaŭ el kovri lin, unu el tiuj du viroj rimarkis la pipon kaj ekdiris kun la indiferenteco propra al la metio: «Kion ni faros el tio?». Unue, la ĉeestantaro opiniis ke li konsideras la mortinton fatraso, kio surprizis ili. Sed la pli aĝa filino komprenis la aludon kaj povis diri nur kelke da plorvortoj, preskaŭ petegaj: «Lasu ĝin al li, al kompatinda patro, ĉar sen la pipo li remortus!»

**G. MORA** (Manresa)

El la kataluna tradukis **Salvador Gumá** (Reus)



# VIGO, KONGRESURBO POR 1986-A

Kun granda plezuro ni informas vin ke la E-Grupo «Paco kaj Amo» de la bela kaj mara urbo VIGO invitas nin okazigi la 46-an Hispanan Kongreson de Esperanto.

Dank'al la ĝentila invito de niaj samideanoj, ni jam scias kie okazos niaj kongresoj dum la tri sekvaj jaroj, nome:

1985-a: Kartageno

1986-a: Vigo

1987-a: Madrido

Pliaj informoj aperos en venontaj numeroj de «BOLETIN».

---

DE FRANCISKO EL ASIZO POR VI..., de Humberto Leite de Araujo. Belega kaj poezieca verko pri la Serafo, kun detala priskribo pri la spiritaĵaj fenomenoj al li okazintaj. Mendu ĉe Spirita Eldona Societo F. V. Lorenz, Caixa Postal 3133, 20001 Río de Janeiro (RJ), Brazilo. Prezo: 8 guldenoj aŭ 8 int. rpk. aŭ interŝanĝo.

---

## UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

(Kotizoj por 1985-a)

MJ Individua membro kun Jarlibro .....	960 p-toj
MA Individua membro kun Jarlibro kaj revuo «ESPERANTO».	2.400 p-toj.
SA Simpla abono al la revuo «ESPERANTO».....	1.440 p-toj.
Kto Abono al la revuo «KONTAKTO».....	720 p-toj.
DM Dumviva membro de U.E.A. pagas 25-oblon de la kotizo de MA .....	60.000 p-toj

Personoj en kategorio (MJ kaj MA) ĝis 25 jaroj, rajtas ricevi senpage KONTAKTON.

Pagojn kaj pliajn informojn:

Juan Azcuénaga Vierna  
Gral. Dávila, 127, portala 7, 2<sup>o</sup> izda.  
Posta Konto: N<sup>o</sup> 03548531  
39007 SANTANDER

Post la apero de mia artikolo en *Horizonto* (n<sup>o</sup> 23a, spt.-okt. 1979a) venis al mi replikoj kun aprobaj au neaprobaj opinioj. Plene konsiderindaj ili ne estis, ĉar iliaj aŭtoroj pro misatento atribuis al mi vortojn aŭ asertojn ne miajn. Unu fakto elstaras: Simplan, klaran kaj plene oficialeblan solvon ni ankoraŭ ne havas, kaj kiom mi scias, neniu ĝin formulis. Plu regas ĥaoso. Korektante artikolojn mi trovas la formojn **ujo**, **io**, kaj eĉ **lando** en la sama teksto, kio pruvas ke oni ĝenerale tute ne scias kiun formon elekti ĉar ankaŭ ĝenerale oni ne elstudis la temon.

La plej multaj landnomoj estas propraj, senafiksaj, kaj la ceteraj —ĉirkaŭ kvindek— fariĝas per lando, ujo aŭ io, precipe en Eŭropo.

Dum mia prelego okaze de la Konferenco de ICNEM en Vilafranca del Penedés mi diris ke koncerne la landnomojn Esperanto venis al ridindeco. Oni memoru pri tiu programero de l' 44a U.K. en Varsovio antaŭ dudek-ses jaroj kaŭzinta ĝeneralan ridegon, sed tamen rezultiginta komisionon, kiu elstudinte la temon eldonis la Mondmapon. Malgraŭ laŭdinda penado ĝi ne prezentis unuecan solvon; tial la landnoma konflikto plu daŭras malkontentige.

En la skemo de Zamenhof, la bazo por Eŭropo kaj kelkaj ne eŭropaj landoj estis la gentoj: Ruso-Rusujo, Japano-Japanujo, Egipto-Egiptujo; por la ceteraj landoj la nomo fariĝis per esperantigo ne ĉiam ĝusta: Peru-Peruo, Cuba-Kubo, Venezuela-Venezuelo. Ni tamen scias el la kvara paragrafo de Homaranismo, ke Zamenhof celis neŭtralajn nomojn; ke li uzas la nunajn nur

provizore. Mi do, pledante kaj klopodante por alprenado de propraj, senafiksaj landnomoj, elpensis nenion novan. Se la landoj portus proprajn nomojn la trikapa fantomo Lando-Ujo-lo hante malaperus kaj estus pli klara kaj flua la nomado de landoj ĉiutage pli ofta pro la internacia politiko kaj intensa sportado. Tiam ili kongruus kun la propraj nomoj de Urboj, de Riveroj, de Vulkanoj, de Montoj, la Lagoj kaj similaj geografiaĵoj ne bezonantaj afiksojn. Estas demandeble, kial el la tuta landaro oni nomas nur ĉirkaŭ kvindek landojn aparte, per genta nomo kun afikso, kvazaŭ la landoj ne estus ia pli grava geografiaĵo ol la urboj, riveroj, montoj kaj similaj.

La esperantigon de l'landnomoj similan al la urbjaj Paris-Parizo, Roma-Romo, Madrid-Madrido, Caracas-Karakaso k.c. devus fari aŭ konsenti la respektivaj landuloj, naturaj filoj ĉar neniu popolo, ankaŭ ne la dubebla internacieco rajtas trudi nomon al alia. Ne estus malfacile esperantigi ĉirkaŭ kvindek nomojn eŭropajn kaj kelkajn ne eŭropajn ĝis nun bazitajn sur la gentoj. Se en la alfabeto de Esperanto mankas la respektiva sono, oni uzu la plej similan; ankaŭ povas helpi la anstataŭigo de la nomo per pranomo se pli adekvata ol la nuna. Mi do ne aprobas la opinion de iu klera samideano kiu volas trudi al popoloj fremdajn nomojn pro supozata internacieco.

La naciaj lingvoj povis en la daŭro de jardekoj aliigi nomojn ĝis nerekonbleco. Ekzemple en la hispana, la urbo Munchen (Munkeno) fariĝis Munich (Muniĉ), la azia Nipon fariĝis Japón (Ĥapon) kaj la pola ka-

purbo fariĝis Varsovia (Varsovoja). Tiu-ĉi en Esperanto tuj fariĝis Varsovio, eble pro la Varsovie de la tiam internacie tre influa franca lingvo. Tamen la nomon Varŝavo mi trovis plurfoje, same kiel oni nun pli ofte trovas Bei-ĵing anstataŭ nia Pekin aŭ Peken por la francoj.

Esperanto devas stari kaj roli super la tro apartaj naciaj lingvaĵoj. La respekto interlanda devas esti reciproka. Ni ne ŝovu la nazon en fremdan vazon eĉ se ne doloras frapo sur fremda kapo.

Tial estas nekompreneble, kial la landoj kies indiĝenoj nomas ilin ekzemple Nipon, Helas, Hispanja, Polska k.a. fariĝis nun en Esperanto malkongrue Japanio, Grekio, Hispanio, Polio, kaj ne Nipono, Helaso, Hispanjo, Polsko... laŭ rekta esperantigo kiel oni faras pri la urboj kaj la cititaj geografiaĵoj.

Per rekta esperantigo de l'landaj nomoj, kiuj estas la propraj, defalus la rasnuancoj kiujn ili entenas: Rus-

ujo, German-ujo, Franc-ujo aŭ la paralelaj Rus-io, German-io, Franc-io k.a., kio ne signifas ke oni konfesas la Homaranismon, kiel iu samideano volis kompreni. Tiu esperantigo certe rezultigus iun vorton kun la neafiksaj finiĝoj **lando**, aŭ **io** kiel Nederlando kaj Alĝerio; sed tio neniel ĝenus ĉar hazardaj aŭ ĉar vorteroj de propraj nomoj.

La lingvoj konsistas el sence kaj signife interplektitaj elementoj. Unu modifo, unu ŝanĝo sekvigas alian neeviteble. Post la landnomoj sekvas la loĝantnomoj, sed pri ili ni parolos alian tagon.

Dume, atendante la definitivan solvon, ni aplikadu laŭ la ekzemplo de Zamenhof, la tre klaran, neniam erarigan sufikson UJ por tiuj landnomoj ankoraŭ bazitaj sur iliaj gentoj. La ŝanĝo de UJ per IO solvis nenion, kontraŭe, ĝi malsolvis la problemon.

Salvador Guma

## Kial mi skribis «Gŭadiano» anstataŭ «Gvadiano»

Bernard Golden

Mi ricevis leteron de leganto el Madrido, kiu demandis, kial mi uzis la nomformon «Gŭadiano» anstataŭ «Gvadiano» en unu el miaj artikoloj aperintaj en **Boletín**<sup>1</sup>. Li citis jenajn loknomojn registritajn en **Plena Ilustrita Vortaro** (PIV), en kiuj la hispana silabo **gua** estas transskribita en Esperanto per «gva»: Gvadalkiviro, Nikaragvo, Gvatemalo, Gvadelupo, Gvaranio, Gvajano, Paragvajo, Urugvajo. Ĉu ankaŭ la

hispana rivero **Guadiana** ne fariĝu «Gvadiano»?

Lastatempe mi komencis uzi «gŭa» (kaj ankaŭ «kŭa») por transskribi la cititajn kaj aliajn loknomojn, personajn nomojn kaj vortojn, kiuj en la hispanlingva ortografio estas skribitaj per **gua** kaj **cua**. Mi pravigas tion per la sekvaj kialoj.

1. La registrado en PIV de hispandevenaj vortoj kaj nomoj kun «gva» en Esperanto ne signi-

fas, ke tio estas la ĝusta aŭ sola transskriba maniero.

2. La transskribado per «gua» kaj «kua» estas fonetisme kaj grafisme pli proksima al la hispanaj etimoj, dum la v-sono en «gva» kaj «kva» estas entrudaĵo. Efektive, estas sciate, de kie ĝi venis. Plena Analiza Gramatiko (PAG) en §4, pĝ. 27 informas, ke «la latina duonvokalo u, kiam ĝi senpere sekvas konsonanton, estas, laŭ la rusa kaj germana prononcado, transskribata per v: gu fariĝas gv, qu fariĝas qv, su fariĝas sv...» Ne temas pri regulo sed nur pri konstato, ke parolantoj de la rusa kaj germana lingvoj kutimas uzi tiun prononcon. Dum la frua periodo de la evoluo de Esperanto, tiuj lingvuloj estis relative multenombraj, do ili trudis sian prononcon en Esperanton, kaj tiel establiĝis la t.n. tradicio prononci per «v» ankaŭ similajn silabojn en vortoj kaj nomoj de plej diversa deveno. Tamen, nuntempe Esperanto estas en la manoj kaj buŝoj de parolantoj de aliaj lingvoj, kies fonetika sistemo ebligas la prononcon de «gŭa» kaj «kŭa», do estas tute nature por ili diri «Gŭadiano», «Ekŭadoro», ks.

Rimarku ankaŭ, ke esceptoj estas registritaj en PIV. La hispana vorto **guano**, laŭ PAG, devas esti transskribita kiel «gvano» sed Zamenhof mem donis al ĝi la formon «guano». Kaj ne estas klare, kial **guanaco** estis asimilita kiel «guanako» anstataŭ «gvanako». Komparu «gvajako», kiu devenas de **guayaco**.

3. Pluraj esperantistoj jam faris provojn enkonduki la modifitan transskribadon sen «v». Jen kelkaj citaĵoj.

- a. Alberto Gómez Cruz<sup>2</sup> el Meksiko skribas: «Diftongoj per ŭ, antaŭ iu ajn vokalo, povas esti tre utilaj kaj oportunaj... Ĉu la Akademio ne deziras oficialigi paralelan uzadon de ŭ en la novaj diftongoj, speciale por propraj kaj geografiaj nomoj?» En la verko de Gómez Cruz troviĝas jenaj landnomoj: Ekŭadoro, Paragŭajo, Urugŭajo, Nikaragŭo, Gŭatemalo, Gŭajano, kaj Venezŭelo.
- b. Salvador Guma<sup>3</sup>, kataluno, opinias, ke «validas la sona, la viva lingvo... Konsekvence ni devus diri... Gŭatemalo, Nikaragŭo, Ekŭadoro, Gŭajano, Paragŭajo, Venezŭelo.»
- c. Leopoldo H. Knoedt<sup>4</sup> estas brazilano, konata pro siaj beletraj tradukoj en Esperanto. Li protestas, ke «Eŭropaj esperantistoj enmetis tiun v sendistinge kaj nepravigeble en vortojn, kiuj laŭdevene devus enhavi la duonvokalan ŭ.» Temas ĉefe pri neeŭropaj lingvoj de Afriko. Azio kaj Ameriko, kaj Knoedt marteladas sian punkton jene: «La blinda apliko de universala transkribo laŭ la rus-germana prononco ŝajnas afero de rutinismo kaj diskriminacio kontraŭ la lingvoj de popoloj alie jam sufiĉe multe diskriminacitaj.»
- d. Lawrence Mee<sup>5</sup> el Britio kompilis liston da landnomoj, en kiu aperas la sekvaj formoj: Gŭatemalio, Nikaragŭo, Urugŭajo kaj Guadelupo. Afrikaj landnomoj sen la tradicia «v» estas: Bocŭano, Malaŭio, Sŭazilando kaj Zimbabŭeo. Mee uzas «ŭ» ankaŭ en «Kuŭajto» kaj la anglaj nomoj «Ŭejk-Insulo» kaj «Ŭalis-kaj-Futuro».

Estas evidente, ke mi ne estas la iniciatinto aŭ la sola proponanto de transskribado per la «ŭ» antaŭ vokalo. Objetoj kontraŭ ŝanĝo baziĝas sur du argumentoj, tradicio kaj Fundamenteco.

1. Konservativaj esperantistoj rifuzas akcepti iun ajn modifon de la tradicia ortografio en Esperanto. Ili ne toleras «tiajn manovrojn», kiuj ŝanĝas aŭ novigas taŭgajn terminojn en vivanta lingvo. Tiel rezonadas Bertil Wennergren el Svedio, kiuj provas sistemigi la landnoman nomenklaturon en Esperanto sen tro da drastaj modifoj. Pli emocia reago venas de Karolo Piĉ en lia recenzo de *La Luzidoj* de Luis de Camoes, elportugaliĝita fare de Leopold H. Knoedt<sup>6</sup>. «Kaj **Gŭadalkiviro, Kŭinto** Fabio kaj **Kŭirino** estas, ĉu portugalaj? monstroj! La lingvo konas nur **Gvadalkiviro, Kvinto, Kvirino**, sed **Kujnto, Kujrino!!!** Kaj ĉu, anstataŭ **kvin**, ni de nun skribu **Kŭin**?» Ne estas malfacile diveni, kial Piĉ ne kapablas toleri la novigitan ortografion de Knoedt; li estas denaska parolanto de slava lingvo, la ĉeĥa.

2. Provon uzi la **Fundamento de Esperanto** por apogi la tradician transskribmanieron faris A. Albault<sup>7</sup>: «La Fundamento preskribas, ke litero ŭ estas uzata nur post vokalo...» Tamen, atenta legado de la kvin diversligvaj tekstoj de la «Unua Libro» montras, ke nur en la rusa kaj germana versioj estas rimarko, ke «ŭ» estas uzata nur post alia vokalo. Krome, tiu klarigo mankas en la Esperanta versio de la «Fundamenta Gramatiko», kiun Zamenhof verkis por **Fundamenta Krestomatiko**. Ne povas temi pri «regulo» aŭ «preskribo», kiel

erare insistas Albault, ĉar nur du el kvin tekstoj mencias tiun limigitan uzon de «ŭ». Albault emfazas la enhavon de la du esceptaj tekstoj, ĉar li volas altrudi sian propran nocion pri la uzo de «ŭ» en Esperanto. Ankaŭ Mee<sup>8</sup> malkovris, ke la «regulo» pri «ŭ» estas la persona opinio de Albault kaj ne havas apogon en la **Fundamento**.

Ĉi-rilate estas necese atentigi pri ankoraŭ unu ofta eraro, la mistransskribado de la hispanaj silaboj **gue, que** kaj **qui**. Homoj ne sciantaj la hispanan lingvon, opinias, ke la **u** en tiuj silaboj funkcias same kiel la **u** en **gua** kaj **cua**, do ili entrudas la «v» ankaŭ en vortojn kiel «**gverilo**» (**guerrilla**) kaj «**pulkvo**» (**pulque**), kaj nomoj kiel «**Torkvemado**» (**Torquemada**) kaj «**Kvito**» (**Quito**). En tiuj silaboj la **u** estas muta kaj servas nur por konservi la velaran sonon de la konsonantoj **g** kaj **q**; ĝustaj estas: **gerilo, pulko, Torkemado, Kito**.

## Notoj

<sup>1</sup> Bernard Golden: La du Meridoj. *Boletín de la Federación Española de Esperanto*, n-ro 254, 1982, pĝ. 7-10.

<sup>2</sup> Alberto Gómez Cruz: *Clave de Esperanto*. 1968, Guadalajara, Meksiko.

<sup>3</sup> Salvador Guma: Pri la landnomoj. *Horizonto*, vol. 4, n-ro 23(5), 1979, pĝ. 103-108.

<sup>4</sup> Leopoldo H. Knoedt. Pledo por ŭ. *Monato*, vol. 4, n-ro 8-9, 1983, pĝ. 6-7.

<sup>5</sup> Lorenc' Mi (= Lawrence Mee): Kontribuo al la Esperanta toponimiko. *Akademias Studoj 1984*, pĝ. 92-104.

<sup>6</sup> Karolo Piĉ: Renesanca eposo (recenzo pri *La Luzidoj* de Luis de Camoes, tradukita de Leopold H. Knoedt). *Dialogo*, vol. 10, n-ro 2 (37), pĝ. 28-29.

<sup>7</sup> André Albault: Kontribuo al la Esperanta toponimiko. *Akademias Studoj 1983*, pĝ. 180-195.

<sup>8</sup> Lorenc' Mi (= Lawrence Mee): vidu noton 5.

---

# NIAJ GRUPOJ

---

**BARCELONA.**—La 30-an de septembro en la sidejo de Barcelona Esperanto-Centro okazis la oficiala prezento en Katalunio de la omaĝa verko al nia forpasinta samideano Ramón Molera, «LA MIRINDA LIBRO». Post la prezentado okazis lunĉo kaj ĉiu membro de B.E.C. ricevis, senpage, ekzempleron de la verko.

Dank'al la interesaj informoj kaj artikoloj aperintaj en diversaj ĵurnaloj kaj gazetoj lavango da gelernantoj aliĝis al la novaj kursoj. La 18-an de Septembro komenciĝis la elementa kurso kiu okazas marde kaj vendrede; samhore, lunde, ekde la 17-a de septembro okazas la meza kurso kaj la supera kurso okazas ĉiumerkrede, ekde la 19-a de septembro.

**CASTELLDEFELS.**—La 6-a de oktobro en la Kulturdomo okazis prelego pri la temo «La Solución al Problema Lingüístico Mundial» kiun akompanis projekciado de taŭgaj diapozitivoj. La 9-an komenciĝis elementa kurso de Esperanto por plenkreskuloj gvidate de instruanto Cristino García, kaj okazanta marde kaj ĵaŭde de la 7,30 ĝis la 8,30 vespere. Ankaŭ, ĉiusabate, s-anoj Yolanda kaj Juan Carlos Chaves gvidas elementan kurson por infanoj de 9 ĝis 14 jaroj.

De la 15-a ĝis la 28-a de Aprilo 1985-a okazos en la Kulturdomo de Castelldefels la 2-a Ekspozicio pri Esperanto. La K.E.G. antaŭdankas la sendon de materialo por la koncerna ekspozicio.

**BILBAO.**—La 8-an de oktobro komenciĝis en la sidejo de la loka E-Grupo, elementa kurso de Esperanto.

Lunde kaj ĵaŭde, ekde la 8-a vespere, estas la kunventagoj de la bilbao-a esperantistaro.

**VALENCIA.**—Dank'al la persistemo de niaj valenciaj samideanoj, fine, la kultura konsilantaro de la Valencia Urbeŝtaro decidis eldoni esperantlingve tri broŝurojn pri Valencio: «Historio kaj arto», «Vojaĝplanoj», kaj «Festoj kaj gastronomio». Se iu deziras ricevi, senpage, la menciitajn broŝurojn, skribu rekte al Valencia Esperanto-Grupo; Gran Via Fernando el Católico, 45 3º; 50008 VALENCIA.

**VALLADOLID.**—La 15-an de oktobro komenciĝis en la sidejo de la loka E-Grupo elementa kurso de Esperanto okazanta lunde, merkrede kaj vendrede de la 8-a ĝis la 9-a vespere.

**LA LINEA.**—La 4-an de oktobro, organizite de la bahai-a komunumo, okazis en la Kulturdomo prelego kaj ekspozicieto pri la Internacia Lingvo Esperanto. La loka ĵurnulo «AREA» informis, eĉ kun foto, pri la evento kaj same faris la radiostacio «RADIO ALGECIRAS». Pro la menciita aranĝo kaj informoj, multaj gejunuloj interesiĝis pri la lernado de la lingvo.

# 12-a Renkontiĝo de la Valencia Esperantistaro

Kiel informite en antaŭa numero de «BOLETIN», la 17-an de junio en la bela urbeto MANISES kolektiĝis la valencia esperantistaro por tie okazigi sian 12-an renkontiĝon.

La aranĝoj komenciĝis tagmeze per bonvenigaj salutvortoj de la Prezidanto de la Esperanto-Grupo de Valencio, organizanto de la evento, s-ro Pont kiu rimarkigis la bezonon de unueco inter la hispanaj esperantistoj.

Sekve, salutis la reprezentantojn de la E-Grupoj de la Valencia Komunumo. Nome de la Esperanto-Grupo «Lumradio» de Cheste salutis s-ano Ricardo García.

Fine, okazis disdonado de diplomoj al la gelernantoj de la E-kursoj de Valencia kaj Cheste, ĉi-lastaj subvenciitaj de la kuba samideano, loĝanta en Usono, s-ro Sergio Docal.

Poste oni projekciis lumbildojn pri diversaj esperantistaj aktivaĵoj kiujn komentariis la usona samideano, loĝanta en Valencio, s-ro Dennis Keefe.

Per vizito al la paroka preĝejo kaj aliaj artaĵoj de la urbo kaj bankedo en grava restoracio finiĝis la ĉijara renkontiĝo kiu estis, laŭ mia opinio, tre interesa, ĉar ĝi bone taŭgis por disvastigi Esperanton.

Ricardo García

---

## INTERNACIAJ KONGRESOJ KAJ KUNVENOJ



**INTERNACIA RENKONTIĜO DE ESPERANTISTAJ GEINSTRUITOJ.** La jara Internacia Renkontiĝo de esperantistaj instruistoj (Freinet-pedagogio) okazos de la 10-a ĝis la 20-a de julio 1985-a en Skofja-Loka (Jugoslavio).

**41-A INTERNACIA JUNULARA KONGRESO.**—Okazonta en Schloos Eringerfeld (F. R. Germanio) de la 22-a ĝis la 29-a de julio 1985-a.

La jaro 1985-a estas proklamita de U. N. kiel **Internacia Junulara Jaro** kaj konsekvence, la programo de la I,J,K, diskutu la specifajn problemojn de la junularo en la moderna industria socio.

Demandoj kiel: Kial tiom multaj junuloj en la materie riĉaj landoj neniel emas integriĝi en la gepatran generacion? Kial multaj junuloj fariĝas pli kaj pli agresemaj? Kiujn celojn havas la hodiaŭa junularo? Jen kelkaj el la demandoj traktotaj en laborgrupoj, seminarioj kaj preleĝoj.

Kompreneble ne mankos la tradiciaj programeroj: Interkona, Teatra, Internacia kaj adiaŭa vesperoj. Novaĵo estos rokkoncerto de la Berlina grupo «La Mondanoj».

**Eringerfeld** estas vilaĝeto apartenanta al la urbo **Geseke** situanta en la fervoja linio Dortmund-Paderborn.

Pli detalajn informojn petu al: Germana Esperanto-Junularo (G.E. J.); Postfach 101422; D-2.000HAMBURG-1 (F. R. Germanio).

# GRAVA LASTMOMENTA INFORMO

Malgraŭ la diversaj klopodoj de la estraro de Hispana Esperanto-Federacio pri la translokiĝo de la Federacio al Alicante, pri kio ni informis en la raporto de la estraro de H. E. F. aperinta en la pasinta numero de BOLETIN, oni informas ke lastmomente, la Sekretario de la Grupo de Alicante s-ano Francisco Sánchez Antón sciigas nin ke, finfine ne eblas tiu translokiĝo, ĉar ili ne sukcesis trovi la taŭgajn membrojn por la nova estraro.

Daŭrigante la kontaktojn, la estraro de H. E. F. akceptis la proponon de Barcelona Esperanto-Centro por translokiĝi la sidejon de la Federacio al la urbo Barcelona.

Kun la celo ke la agado de la Federacio ne interrompiĝu dum la venonta jaro, oni akceptas, provizore, ĉi tiun proponon, ĝis kiam, laŭ niaj statutoj, la Ĝenerala Kunsido de H. E. F. kunvenonta en Kartagena aprobu ĝin.

La nova estraro konsistos el:

PREZIDANTO: S-ro Salvador Aragay i Galbani.

VICPREZIDANTO: S-ro Luis María Hernández Yzal.

SEKRETARIO: S-ro Víctor Ruiz Gómez.

VICSEKRETARIO: S-ro. Josep Miranda.

KASISTO: S-ro Joan Font.

Ĉefredaktoro de «BOLETIN»: S-ro Giordano Moya.

De nun, la nova adreso de la Federacio estas:

Hispana Esperanto-Federacio

Carreras Candi, 34-36.

Telefono (93) 2402662.

**08028 BARCELONA**

Pri la konto por sendi la kotizojn, ni informos en la venonta numero de «BOLETIN».

---

## KOTIZOJ POR 1985-a

La kotizoj por 1985-a estos la samaj ol por la nuna jaro 1984-a, tio estas:

Simple Membro .....	1.000 p-toj	
Helpa Membro .....	2.000 "	
Junulo (ĝis 26 jaroj) .....	700 "	(1)
Dumviva Membro .....	20.000 "	
Simple Abono (nur por eksterlandanoj) ..	500 "	

Pagante frue vian kotizon, vi ege helpas nian laboron.

(1) Junuloj rajtas, krome, ricevi senpage la Junularajn revuetojn HEJS-JUNECO kaj Konkize.



# MODIFICACIONES AL DIRECTORIO

## ALTAS

### ALICANTE (030)

- 2.733 Carretero Ortega, Rosa María; Hnos. Bernard, 22; 06
- 2.734 Huerta Ruano, María José; Prudencio Viña, 14; 07
- 2.741 Pascual Isidro, Amador; Francisco González Sánchez, 29; 13.
- 2.747 Rivas Ordóñez, Brígida; Edif. Gafner 6, 24 B La Albufereta

### ALCOY (Alicante)

- 2.743 Micó Martínez, Miguel; Na Saurina d'Entenca, 6

### BARCELONA (080)

- 2.749 Cid, María Elena; Xucla, 19 Residencia; 01

### BADALONA (Barcelona)

- 2.746 Ruiz Criado, Rafael; Pza. Roca i Pi, 1, 1º

### PREMIA DE MAR (Barcelona)

- 2.748 Casanovas, Leandro; Levant, 11

### SANTA COLOMA DE GRAMANET (Barcelona)

- 2.738 Pérez i Aregio, Joan; Rafael Casanovas, 91

### CORUÑA. LA (150)

- 2.735 Vázquez Páez, Enrique; Franja, 20, 2º; 01

### GERONA (170)

- 2.744 Llapart Costa, Carmen; Gral Peralta, 6 A; 07

### SAMOS (Lugo)

- 2.736 Herrojo Rodríguez, Julián

### MADRID (280)

- 2.737 Martín Lozano, Jacinto; Castelló, 3; 01
- 2.743 Torralbo Gil, Luis; Carabelos, 25; 41

### FUENLABRADA (Madrid)

- 2.732 Ortega López, Isidoro; Salamanca, 3, 4º C

### CARTAGENA (Murcia)

- 2.740 Ruiz García, Pedro José; Urb. La Finca, 14 La Loma de Pozo Estrecho

### CHESTE (Valencia)

- 2.745 García Tarín, Ricardo Manuel; Barón de Cheste, 28

### VALLADOLID (470)

- 2.739 Martínez Giralda, Felicidad; Turina, 9; 06

## BAJAS

### SABADELL (Barcelona)

- 2.498 Gabarra Sala, Teresa

### BILBAO

- 350 García Brañanoba, Angel

## CAMBIOS DE DOMICILIO

### LA GRANADA (Barcelona)

- 2.648 Piñol i Sabater, Joan; Sant Cristofor, 8

### MADRID

- 1.448 Ortiz García, Tomás; Pasaje Depósito RENFE 45 1º

### VIGO

- 2.141 Quintas Montero, José Carlos; Robles, 12

## CORRECCIONES

### ALCASSER (Valencia)

- 2.458 Rodríguez i Llacer, Abelard; Verge del Carme, 31.

# 45-a Hispana Ko



Akceptejo de la Hotelo Alfonso XIII

## Informo pri Loĝado

### Hoteloj

Husa CARTAGONOVA (Tfno: (968) 50 42 00)

Tristela hotelo situanta en la centro de la urbo (Marcos Redondo, 3) kun privata garaĝo; salono de TV, kafejo kaj kunven-salonoj.

Husa ALFONSO XIII (Tfno: (968) 52 00 00)

Dustela hotelo situanta en la centro de la urbo (Paseo Alfonso XIII, 30) kun privata garaĝo, kafejo, salono de TV; Restoracio, k.t.p.

Rezervojn faru al unu el la jenaj adresoj:

Rambla de Cataluña, 14; Tfno: (93) 3 18 13 86; 08007 BARCELONA.

Reina, 17; Tfno: (91) 1 31 10 75; 28004 MADRID.

Paseo Alfonso XIII, 30; Tfno: (968) 52 00 00; CARTAGENA (Murcia).

### Restadejo

Universitata Restadejo «ALBERTO COLAO» (Tfno: (968) 10 03 11 - 10 03 15).

Situanta en la centro de la urbo (Hno. Pedro Ignacio s/n) proponas la jenajn servojn: Universitata Manĝejo; Kafejo; Kunvensalono; Aŭloj; Muziksalono; Biblioteko, k.t.p.

**Loĝkapableco:** 150 Individuaj ĉambroj.

**Prezj** (proksimumaj) 135/140, ĉambro po tage.

1.200 p-toj tage la plena pensio (tri manĝoj).

Rezervojn:


45-a Hispana Kongreso de Esperanto.

Apartado, 461

CARTAGENA

(Murcia)

Hispanio



Ĉambro de la Universitata Restadejo

# Kongreso de Esperanto


(Cartagena, Hispanio;

5-9 julio 1985-a)

**KONGRESEJO:** Universitata Resta-  
dejo «Alberto Colao».

(Strato: Hno. Pedro Ignacio s/n)

**TEMO:** La Maro kiel faktoro de  
Komunikado.



Kongresejo kaj situo en la Urboplano

## 5-an Vendredon

Malfermo de diversaj ekspozicioj

Disdonado de dokumentoj

Interkona Vespero

## 6-an Sabaton

9.00 Artaj kaj Sciencaj Horoj

10.00 Vizito tra la urbo

13.30 Kunveno de la Hispana Jubilea Komisiono

17.00 Artaj kaj Sciencaj Horoj

17.00 Fakaj Kunvenoj

19.00 Seminario pri la Kongresa Temo

21.00 Arta Vespero

## 7-an Dimancon

9.00 Artaj kaj Sciencaj Horoj

9.00 Kunveno de la Hispana Jubilea Komisiono

9.30 Ekzamenoj

12.00 Solena Inaŭguro de la Kongreso

Oficiala Foto

17.00 Artaj kaj Sciencaj Horoj

17.00 Oficiala Prezento de Novaj Verkoj

18.00 Kunsido de la estraro de H.E.F. kun Delegitoj de Grupoj kaj Sekcioj

20.00 Hispanlingva Prelego

21.00 Junulara Aranĝo

## 8-an Lundon

9.00 Artaj kaj Sciencaj Horoj

10.00 Ĝenerala Kunveno de H.E.F.

13.00 Publika Kunveno de la H.J. Komisiono

17.00 Kunveno de redaktoroj de E-gazetoj

17.00 Artaj kaj Sciencaj Horoj

19.00 Esperantlingva Prelego

20.30 Oficiala Fermo

22.00 Bankedo

## 9-an Mardon

Tuttaga ekskurso.

# LA ESPERANTO - BULTENOJ

Lastatempe svarmas la Esperanto-Bultenoj en nia lando. Ĉiu grupo deziras havi sian heroldon. Ĉiu grupo deziras informi pri sia agado, pri sia esperantisteco, entuziasmo kaj praktika dediĉo al Esperanto. Tiucele kaj ne diskuteble, la plej taŭga rimedo estas la skriba komunikado. Kompreneble, la interŝanĝo de sonbendoj kaj eĉ intergrupaj kunvenoj ĉiam estas praktika, sed ja estas multe pli kompleksa ilia organizado. Surpaperigi la laboron faritan kaj la estontajn projektojn estas multe pli facila laboro kaj eĉ pli taŭga kaj diskoniga.

Kion signifas tiu abundo de grupaj bultenoj?, ĉu tio signifas, ke la movado enlanda tre vigliĝas? Se ni konsideras la nombron de aliĝintoj al Hispana Esperanto-Federacio, al la lokaj grupoj kaj al aliaj enlandaj organizaĵoj, la konkludo estas nea, almenaŭ laŭ mia vidpunkto. Tamen estas vero, ke lastatempe aperis multaj skribemuloj, kaj tio estas bona por la Esperanto-Movado. Kompreneble skribemuloj en Esperanto, ĉar fakte estas bone skribi pri Esperanto, sed estas multe pli valore skribi en Esperanto pri Esperanto aŭ pere de Esperanto pri senfina vico da temoj de nia ĉiutaga vivo. Tiu kontakto, kiun donas la bultenoj en Esperanto, estas la kaŝita nevidebla energio de la esperantismo. La bulteno estas unu el la plej taŭgaj instigiloj por la eklernado kaj plua lernado de la lingvo. Tamen, kio gravas estas scii kion publikigi por vekti la atenton de la leganto. Sendube en tiu tasko kuŝas la sukceso de ĉiu bulteno. Iamaniere oni devas «trompi» la leganton, por ke li entuziasmiĝu pri la bultena enhavo. Precipe tiu «trompado» estas tre necesa por la komencantoj aŭ por tiuj personoj, kiuj «restis en la meza vojo», inter eklernado kaj ellernado de la lingvo. Do, la tasko de la bultenoj en Esperanto estas vera juvelo por la instruado de la lingvo. Mi memoras, ke iam, kiam «Boletín» estis eldonata en Valencio, mi prenis parton en traduko de mallonga teksto. Mia surprizo estis grandioza, kiam mi legis en la sekvanta bulteno, inter la listo de la sukcesintoj, mian nomon. Tiu simpla okazintaĵo donis al mi impulson kaj stimulis min al plua lernado kaj fido al la lingvo.

Sed aparte, de tiu tasko lerniga la bultenoj en Esperanto estas la unua ŝtupo de ĉiu skribemulo. Ĝi, la bulteno, estas la granda paŝo sur la vojo de perfektigo, por atingi de gazetoj multe pli altrangaj. La lokaj bultenoj en Esperanto estas kvazaŭ la elementa ternejo de la skribema esperantisto. Jen tasko, kiun neniu grupo devas neglekti: instigi ĉiun membron de la grupo al la skribado. La laboro de la redaktoro aŭ de la lingva kontrolanto estas senmezura, ĉar la bulteno laŭeble devas aperi en perfekta Esperanto, ĉar en tio kuŝas la venko de Esperanto en ĝia konstanta agado. Tiucele ekzistas neniam alia vojo.

Estas vero, ke ĉiu grupo havas membrojn nomatajn simpatiantojn, kies nura kunlaboro estas ilia kotizado. Fakte tiu membraro apenaŭ konas Esperanton. Tamen ili kunlaboras ekonomie por Esperanto. Evidente, se ili konstatus, ke ilia mono estas dediĉata, ne por Esperanto, eble ili tuj forlasus la grupon. Konsidere al ĉi tiuj membroj, oni devas sendi abundajn cirkulerojn en la gepatra lingvo, kaj eĉ estas konsilinde presigi paralelan tekston Esperanto-nacilingvan eĉ se tio signifas plian laboron por la redaktoroj. Do jen la kerno de la sukceso de Esperanto. Neniel oni devas rezigni la plej gravan principon de la esperantismo: la praktikadon de la lingvo en ĉiuj ĝiaj facetoj.

Luis Serrano Pérez

# RECENZOJ, RECENZOJ, RECENZOJ

**SFEROJ-2. SCIENCFIKCIO KAJ FANTASTO.** Kompilis: Miguel Gutiérrez Adúriz. Kovrilpaĝo aranĝita de Manuel García Ledo. Eldonas: Miguel Gutiérrez Adúriz (Grupo Nifo). Presis: Gráficas El Tinell. Barcelona, 1983. 145 paĝoj. Aĉetebla ĉe Libroservo de HEF. Prezo: 650 p-toj.

Verŝajne anstataŭ recenzon ni devus pritrakti aliajn aferojn rilate la supran verkon, pasintjare aperintan en la esperanta libro-merkato (feliĉe jam anonciĝis prezento de nova SFEROJ-3 dum 44-a Hispana Kongreso de Esperanto). Ja, ĝi estas la dua numero de SFEROJ (ĉu SciencFikciaj eroj, ĉu SciencFikciaj Esperantaj Rakontoj, ĉu...). La unua estis eldonita sub ŝildo de HEF, la dua ne. Kial? Eble, plia bagatelajo en nia pacema movado. Ĝi enhavas 13 etajn kompletajn rakontojn el 13 malsamaj landoj, el tri kontinentoj; kunlaboris 12 personoj por tiuj tradukoj, el dek diversaj lingvoj. El nunaj kunlaborantoj 6 kunhelpis por la unua numero, do kontinueco en la laboro. Ni trovis kelkajn ne gravajn erarojn, eble kompostajn, el kiuj elstaras Uruvajo (paĝo 121), anstataŭ kutima Urugvajo. Certe ke la temo postulas kreon de novaj vortesprimoj en Esperanto, kaj tial ni trovas neologismojn, kies klarigojn ĝenerale ni renkontis. Ofte en esperanta verkaro mankas informo pri eldonkvanto, ankaŭ nun. Ankaŭ mankas nomo de la aŭtoro —kiu, tamen aperas je la fino— en rakonto tradukita de akademiano s-ro de Diego. Kuriozaĵo estas ke ĉe sveda rakonto aperas memportreto de la desegnisto.

La libro ne estas ia plia provo eldoni ion laŭplaĉe kaj esperante, sed ĝi estas grava klopodo por prezenti tiujn fakajn literaturaĵojn en nia Internacia Lingvo, sub ege bona lingva nivelo kaj kun granda strebo por atingi altkvalitan eldonaĵon, similan al tiuj plej bonaj en nacilingvaj libro-merkatoj. Alia grava kaj interesa novaĵo estas ke preskaŭ ĉiuj desegnoj estas originalaj, speciale faritaj por SFEROJ, de profesiaj desegnistoj: Rubén Pellejero kaj José Torres. Elstaras ankaŭ elekto de aŭtoroj, kiel Jorge Luis Borges, Mike Kesterton, István Nemere, Lafferty kaj aliaj, eĉ ĉina sciencfikciaĵo, ne sufiĉe konata de ni eŭropanoj; sed ne malpli grava estas la laboro de tradukintoj —ni menciis jam S-ron de Diego—: Csaba Finta, Karl Pov, Giulio Cappa, Adolf Stanura, Liven Dek —pseŭdonimo de konata samlandano—, kaj aliaj. Nu, SFEROJ-2 estas libro aĉetinda ne nur pro tio ke ĝi estas eldonita en Esperanto, sed ĝuste car ĝi publikiĝis en bonega esperanto, kun vere interesaj fakaj desegnoj kaj alloga kovrilpaĝo. Certe, tiu verko donas prestiĝon ne nur al nia Internacia Lingvo, sed ankaŭ al nia eldona kapableco. Agrablaj litertipoj faciligas legadon kaj presado estas alia bone plenumita tasko. Do, aĉetinda verko kiun ni povas fiere montri al ne-esperantistoj kaj des pli bone por tiuj kiuj vere amas esperanton kaj ĝuas ĝian legadon.

Tamen, nun mi demandas nin, kiu(j) ebligas tiun valoran eldonaĵon en Esperanto? Kio vere estas tiu «Grupo Nifo»? Ĉu vere tiu grupo ekzistas aŭ ĉu ĝi vivas pro peno kaj kuraĝo de unusola homo, kiel multaj

movadaj entreprenoj? Ja, mi forte timas ke movada afero kiu funkcias dank al senlacaj klopodoj de unu aktiva aganto ne tro longe ekzistos. Sed, eble mi eraros —dezirinde—, kaj por pruvi tion, kio plej bona ol pliaj SFEROJ en nia libro-merkato? Jam eldoniĝas SFEROJ-3 kaj 4-a kaj 5-a SFEROJ prepariĝas —kovrilpaĝoj jam estas pretaj—; do, mi esperas kaj deziras longan kaj sukcesan vivon por SFEROJ, tiel aprecindaj kiel nuna SFEROJ-2.

JUAN AZCUENAGA

**LA SINDONEMA ARBO.** Verkis: Shel Silverstein. Tradukis: So Gilsu. 59 paĝa ilustrita libreto. Formato 17,5 x 22 cm. Seulo, Koreujo 1983-a.

Aĉetebla ĉe Libro-Servo de H.E.F.: Prezo 360 pesetoj.

Jen proza fableto por infanoj, esperantigita de nia korea amiko So Gilsu, kiun oni ekkonis okaze de la Hispana Kongreso de Esperanto, en Zaragozo, la jaron 1983-an.

En ĝi prezentiĝas dialogo de uleto kun pomarbo, kiu abnegacie sin proponas al la infano. Trafaj desegnaĵoj ilustras la rakonton. Malgraŭ kelkaj iom ĝenaj preseraroj, la lingvaĵo de So Gilsu estas bona, tre komprenbla. La libreto ege taŭgas por geknaboj iniciĝintaj en la lingvon de Zamenhof.

VELUS

**ĈU VI KONAS LA TERON?** de Endre Dudich.

Aĉetebla ĉe Libro-servo de H.E.F. Prezo, 670 p-toj.

Aperis la libro **Ĉu vi konas la teron?**; **Ĉapitroj el la geologiaj sciencoj** originale verkita en Esperanto de d-ro Endre Dudich, eldonita de Scienca Eldona Centro de UEA, Budapeŝto.

Ĉi tiu altnivela enkonduko en la geologion estas la plej grava kaj plej ampleksa antaŭenpaŝo sur la kampo de tiu scienco en la Internacia Lingvo. La aŭtoro traktas en populariga maniero tra 12 ĉapitroj la jenajn subbranĉojn de la geologio: geonomion, geokemion, mineralogion, dinamikan geologion, petrologion kaj sedimentologion, paleontologion, tektonikon, ter-internon, ter-historion kaj stratigrafion, aplikajn geofizikon kaj geologion, kosmogeologion kaj planedologion.

Ĉiun ĉapitron akompanas abundaj figuroj kaj tabeloj, kiuj vivigas kaj klarigas la tekston. Fine aperas geologia leksikoneto kaj listo de rekomendita Esperanta kaj alilingva literaturo. Antaŭparolon verkis inĝ. Petăr Todorov, estrarano de UEA pri faka agado.

## DONATIVOS PARA LA FEDERACION

Suma anterior .....	3.235	Vicente Hernández .....	600
Antonio Ferrer .....	250	José Fernández .....	500
Antonio Costa .....	300	Ana María Molera .....	250
José María Claramunt .....	200	Faustina Martínez .....	1.000
Georgette Lelievre .....	500		
Juan Martínez .....	500	Suma y sigue .....	7.335

# DEZIRAS KORESPONDI

Pri muziko, pentroarto, k.t.p. kaj por interŝanĝo de p.m. kaj moneroj, studentino pri librotenado, komencantino. F-ino Rosalba Betancourt González, Cra 14 7-14 FLORIDA (Valle de Cauca); (Kolombio).

Kun hispanaj geesperantistoj pri fremdaj lingvoj, vojaĝoj kaj literaturo; 23 jaraĝa universitata studentino. F-ino Julia Kruk; ul. Nowodworska 25/16; 85-120 BYDGOSZCZ (Pollando)

Pri sporto, turismo, muziko kaj literaturo, 26 jaraĝa komencanto. S-ro Wojciech Grochowski; ul. Wawelberga 3 m 185; 01-184 WARSZAWA (Pollando)

Kun hispanaj junuloj, 16 jaraĝa hungara komencantino; F-ino Diana Unger; Damtanich, u 11; 7.624 PECS (Hungario)

Kun hispanaj geesperantistoj pri diversaj temoj. S-ro Cvjatko Todorov, p. k. 60, ŜUMEN (Bulgario)

28 jaraĝulo pri fotografio, filmo, turismo, historio, k. a kaj por interŝanĝo de bildkartoj kaj poŝtmarkoj. S-ro Zbigniew Siekierski; ul. Sadkowska 13 m. 8; PL 26-600 RADOM (Pollando)

Kun la tuta mondo, 26 jaraĝa kuracisto. D-ro Akwasi Owusu OSEI: Komfo Anokye Teaching Hospital; P.O. Box 1.934; KUMASI (Gano)

Pri elektroniko, S-ro FOLEY A. Ekué; B. P. 13.528; LOME-NYEKONAKPOE (Togolando)

20 jaraĝa lernanto, kun la tuta mondo; s-ro HIAG EKANGA 1er; s/c M. BELL Jacques; B.P. 1323 DOUALA (Kamerunio).

23 jaraĝa studento. S-ro BOUMEDIENE Djamel; B.P. 432; TLEMCEN (Alĝerio)

KLARIGA NOTO.—La lastajn kvar adresojn ni ricevis de la komisiito de U.E.A. por Afriko-Azio, s-ro H. Bakker; Kastelenstraat, 231; 1082 EG Amsterdam NEDERLANDO, kiu konsilas la jenon: «Afrikaj lernantoj ne havas eblecon multe praktiki la lingvon. Korespondado estas por ili, krom plezuro, ankaŭ lernado. La ne-afrika korespondanto skribu nepre en **senerara simpla** kaj **klara** Esperanto. La poŝto en Afriko estas ofte nefidebla. Sendu viajn leterojn aĉpoŝte.

---

## NEKROLOGO

**Alberto Díaz Chapartegui** (1892-1984) forpasis la 22-an de Oktobro en Southampton (Britujo), kie li dum diversaj epokoj loĝis kun sia filo Amador.


Nuna Dojeno de la Bilbao-a esperantistaro, li lernis Esperanton dum 1908-a de s-ro Elizondo, unua Prezidanto de la Bilbao-a Esperanto-Grupo. Li ankaŭ prezidis la Grupon dum malfacila historia momento, li gvidis multajn kursojn tre sukcese kaj li faris multenombrajn prelegojn speciale pri abelbredado je kiu temo li estis vera specialisto.

Ĉiam preta konsili kaj simpatie klarigi la diversajn spertojn kiujn li travivis dum siaj vojaĝoj al multaj Esperantaj Kongresoj, la bilbaoanoj suferas hodiaŭ gravan perdon.

KE LI PACE RIPOZU

---

**Cobre  
energizado**



**Kröll**  
Bracelets

**Oro que da  
juventud.**

*Por cientos de años hombres y mujeres de todo el mundo han usado brazaletes de cobre, por sus cualidades terapéuticas.*

*Ahora nosotros presentamos con orgullo el brazalete de cobre, enchapado en oro de 24 K.*

*Este brazalete está diseñado para ser usado permanentemente, al mayor contacto con la piel y evitando que los puntos extremos se unan.*

*El cobre es catalizador del ácido úrico y absorbe la sal, por tal motivo, puede producir una mancha verdosa en la piel, lo que indica que usted debe reducir su consumo de sal.*

*Se lo ofrecemos con la seguridad que usted disfrutará lo que nosotros creemos es el mejor brazalete del mundo!*

*¡Use esta joya y siéntase joven!*

En cualquier caso de consulta dirijase a :

DISTRIBUIDOR EXCLUSIVO:  
**INTERUNIMEX, S. A.**  
SOR ANGELA DE LA CRUZ, 9 7.º G  
28020 - MADRID -